

**Numero: 268.**  
**Septembro: 2014.**

**22-a jarkolekto**

## Literaturaj Folioj

# VESPERTO



**Redaktanto:**  
**Apáti Kovács Béla**  
**Kaposvár**  
**Béla király u. 44.**  
**H-7400 HUNGARIO**  
**Telefono: 82/ 410-664**  
**Retadreso: [espbel@t-online.hu](mailto:espbel@t-online.hu)**  
**Eldonanto: Kapošvara Esperanto Centro**  
**Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet**

## Aŭtunaj pensoj

Min ĉiam ravas la aŭtuno. Eble ĝiaj koloroj, eble ĝia animagordo estas tio, kio malliberigas min, sed tiu ĉi mallibereco ne estas malbona. Mia koro trankviliĝas rigardante la aŭtunan pejzaĝon.

Mi estas esperantisto. Mi rememoras; estis aŭtuno, kiam unuafoje mi trapaŝis la sojlon de la Zalaegersega Esperanto klubo Juna Koro.

Tiam mi ne pensis, ke tiu ĉi lingvo estos tiom grava en mia vivo. Nun jam mi scias, mi naskiĝis duafoje en la tiama Esperanto klubo.

Ni estis junaj kaj gajaj. Ni ĝuis la vivon kaj apenaŭ interesis nin la ĉiutagaj malfacilaĵoj. Ni pensis, ke ni ĉion superos, kaj post kelkaj jardekoj la mondo estos pli bona.

Laŭ mi junaĝe oni ĉiam estas esperoplena, kaj kredas je la estontaj sukcesoj.

Nur poste oni rekonas; la mondo ŝanĝiĝas malfacile, kaj ofte en malbonan direkton.

Nia koro ankoraŭ estis juna, en nian kapon ennestiĝis la espero.

Ni ĉiuj estis geesperantistoj. Fervoraj adaptoj de d-ro Zamenhof. Ni trinkis avide liajn vortojn kaj la internan ideon. Ni lernis diligente lian grandiozan lingvon. Ni ĝojegis, kiel eta infano ricevante donacon, se ni sukcesis komprenigi nin kun alilingvano.

Kiom belegaj komunaj eksterlandaj vojaĝoj partoprenante diversajn Esperanto - kongresojn, aranĝojn.

Estus bone revivigi tiujn ĉi admirindajn jarojn. Sed mi scias, ili jam forflugis, kiel la hirundoj al pli varmaj kontinentoj.

Denove estas aŭtuno, kaj mi rememoras pri tiuj karaj klubaj vesperoj en la urbo Zalaegerszeg.

Mi rigardas la terenfalantajn, flavajn kaj sekajn arbofoliojn. En iu tago ankaŭ mi tiel ĉesos vivi. Sed nun ankoraŭ mi vivas, kaj en mia koro flagras la fajreto, kiu estis ekbruligita en Esperanto klubo kun multaj, bonaj geamikoj.

Aŭtuno estis la komenco de mia dua naskiĝo. Mi esperas, ankoraŭ estos multaj aŭtunoj kaj ankaŭ aliaj homoj povos travivi tiun ĉi senton.

Do, kara aŭtuno mi amas vin kaj mi deziras, ĉarmu la koron de ĉiu homo, ke ankaŭ ili ekkonu Esperanton!

-Redaktanto-



## Ĉiakoste lerni fremdan lingvon

-Kara, - diris ĉarmulino al sia amikino – mi devas lerni la anglan lingvon. Espereble plej rapide. La tempo urĝas min. Ĉu vi povus rekomendi al mi bonan lingvoinstruiston?

-Kompreneble. Mi konas tian personon. Li estas juna, belaspekta lingvoinstruisto de la angla lingvo. Li instruos al vi fulmrapide ĝin. Sed ĝi ege multekostas. Lia horosalajro kostas kvin mil forintojn. Ĉu vi petas lian adreson?

-Jes mi petas. Bonvolu! Mono ne gravas, se mi povos ellerni rapide kaj perfekte la anglan lingvon.

La amikino notis lian adreson en slipeton kaj la du virinoj ankoraŭ babiladis iomete pri bagatelaĵoj.

Ili denove renkontiĝis post kelkaj semajnoj. La junulino, kiu rekomendis bonegan lingvoinstruiston scivole demandis:

-Kiel progresas via lingvolernado de la angla lingvo? Ĉu la sinjoro instruisto estas spertulo?

-Jes, li estas tre sperta. Li jam instruis al mi multe da aferoj. Mi estas tre, tre dankema al vi, kial vi rekomendis lin por mi. Li ne nur sperta, sed ankaŭ ege kara, eĉ karega viro. Mi ankoraŭ ne renkontis tian grandiozan lingvoinstruiston.

-Mi ne miras. Ankaŭ de li mi lernis la anglan lingvon. Lia instrutekniko estas mondfama. Ĉu ne?

-Prave. Lia instrutekniko. Tio estas tre bona.

-Ĉu vi jam scias perfekte angle?

Sekvis longa paŭzo. La demandita junulino mutiĝis. Ŝi mistere rigardis sian amikinin. Ŝiaj lipoj ekridetis petoleme, kvazaŭ diablo estus kaŝiĝinta en ŝin.

-Ĉu angle? Ĉu perfekte?

-Jes, kara, vi diris, ke vi deziras lerni la anglan lingvon.

-Ho, jes mi serĉis lingvoinstruiston. Mi trovis la perfektan ulon. Tage kaj nokte ni ekzercas la lingvon.

-Tio ĉi signifas, ke vi jam ellernis la anglan lingvon. Ĉu ne?

-Parte. Mi ne scias eĉ unu vorton en tiu ĉi lingvo. Sed kiun interesas tio, se la sinjoro lingvoinstruisto kisas, kisegas bonege kaj li estas la majstro de la amorado.

-Tamen estas bona afero la lingvolernado. Ĉefe, se la lingvoinstruisto bela kaj simpatia ulo..

-Ŝaŝa-





# Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-  
III-a


-Jen mia modesta loĝejo – diris ridetante la onklino kaj ŝi gvidis Johanon al la brile instalita tagĉambro.

Li sciis, sia onklino Izabela ŝatas la ordon, kaj li jam aŭdis multe pri la lunaj urboj, sed li ne pensis, ke dum kelkaj horoj tiom da surprizoj atendos lin sur tiu ĉi planedo. En la tagĉambro ĉio estis la plej moderna. Oni supozus, ke tiaj oldulinoj prefere vivas inter malnovaj mebloj kaj objektoj, kiuj memorigas la proprulojn pri la iamaj forkurintaj jaroj, jardekoj.

Kien ajn li rigardis, ĉie li vidis modernajn aĵojn.

Johano bone ĉirkaŭrigardis en la ĉambro. Lian miron interrompis la gaja rido de lia onklino.

-Ĉu vi ankoraŭ ne vidis tagĉambron Johaĉjo? Antaŭ nelonge mi renovigis ĉi tie ĉion. Fartu bone kaj hejmece! Mi iras rigardi, ĉu la roboto kuiris la tagmanĝon.



-Onklino, ja vi diris ankoraŭ en la flughaveno, ke vi mem kuiris por mi. Ĉu ne vi faris tagmanĝon, sed roboto?

Izabela denove ekridis kaj ŝi diris:

-En la roboto loĝas mia memo. Tiel ĝi estis fabrikita, ke ĝi estas ankoraŭ mi.

Johano jam aŭdis multe pri la altnivela luna tekniko, sed li ne pensis pri tia fantasta kaj bravura eblo, por ke roboto povas anstataŭi ankoraŭ la homan animon. Li povis diri nur: ho! kaj li ekmanĝis la bongustan supon ĉe la tablo, kiu videble estis projekciita kaj nur poste materiigita el la elektitaj bildoj por la tagmanĝo.

La onklino feliĉe rigardis sian malsatan nevon, kiu avida manĝis. Ŝi modeste kulerumadis la supon kaj ŝi apenaŭ manĝis el la dua porcio.

-Kara onklino mia, ĉu vi ne estas malsata? – demandis Johano kaj li ĉerpis ankoraŭ duafoje el la vaporanta supo.

-Mi manĝas nur malmulte, kara. Sed mi vidas, vi malsatiĝis dum la longa vojaĝo. Ĉu ne?

-Jes. Mia panjo diris, ke vi povas kuiri grandioze, sed mi ne pensis, ke tiom bone. Vere ankoraŭ mi ne komprenas, kiel vi povis unuiĝi kun la roboto.

Kvazaŭ vi estus dirinta al mi, kiam vi atendis min en la flughaveno, dume via dua memo kuiris la tagmanĝon. Ĉu tiel tio okazis?

-Ĝuste. Mi estis samtempe ankoraŭ en la flughaveno kaj ankoraŭ en la kuirejo.

-Mi supozas, vi havas ankoraŭ trian, kvaran aŭ multan memon. Ĉu ne?

La onklino mute kapjesis. Ŝi signis per sia mano apenaŭ videble kaj sur la tablo ekaperis la dua porcio, kaj tiam samtempe la neuzitaj kaj malpuraj manĝiloj malaperis. La tablo denove estis bela, kvazaŭ ankoraŭ neniu estus sidinta ĉe ĝi.

La luna civilizacio antaŭis la teran. Kvankam antaŭ jarcentoj la koloniistoj alvenis el la najbara planedo.

Dio scias, kiel sur Luno neniam estis militoj. La ĉi tien alvenintaj homoj vivis en paco kaj kompreno. Baldaŭe la armiloj ĉiuj eniĝis la lokajn muzeojn kaj la vizitantoj mire rigardis ilin. Neniu komprenis, kial murdi la alian.

Post la tagmanĝo ili trinkis specialaĵon, kaj ĝi donis bonhumoron al Johano. Dank' al ĝi, lia laceco forvaporigis kaj li estis preta promeni iomete en la ĉirkaŭaj stratoj kaj parkoj.

En la lunurbo estis multaj, floraj parkoj. Ili estis pli grandaj ol la teraj. Efektive la tutan parkon oni ne povis travagadi per piede. Oni bezonis parkoveturilon, se oni deziris iri al la plej malproksima punkto de la parko.

La alia intereso estis, ke la parko situis ne nur surface, sed ĝi estis ankoraŭ en la spaco, eĉ sub la arboj, arbustoj. Kvazaŭ ĝi estus pluretaĝa parko. Estis lokoj, kien oni ekstaris kaj per ia mistera antigravita ilo povis flugadi, kiel birdo. Ĝi estas por Johano eksterordinara travivaĵo.

Dum tia flugado kun sia amata onklino neatendite li ekvidis sian kunvojaĝantinon Elizabeton.

-Elinjo – li ekkriis kaj li tuj flugis al la junulino.

( daŭrigota )





# Poezio

-Nuntempe oni ne legas poemojn. Kvazaŭ jam la poezio ne interesus nin. Ni prefere rigardas stultetajn filmojn, kiuj temas pri nenio, aŭ ni aŭskultas muzikon kun primitivaj tekstoj. En tiuj ĉi tekstoj ripetigas centfoje bagatelaj frazoj, kiujn oni baldaŭ forgesas.

-La poetoj ne estas honoritaj, kiuj almenaŭ povas verki verajn poemojn, kiuj vekas en nia cerbo pensojn.

-Ni ne lasu morti la poezion, kaj ni ĉiutage legu Esperanto versojn!

## Poemoj de Yohanes Manhitu

### Sufera frukto



#### *Al diligentaj laborantoj*

Akvo fluas el brila vasta frunto  
pleniganta malhelan vizaĝon.  
Tiu akvo estas ŝvito pro suno bruliganta,  
la vizaĝo estas de farmisto.

Pluvo kaj sunbrilo estas vizitantoj  
donantaj bonan kaj malbonan mesaĝojn.  
Paseroj kaj kolomboj estas malamikoj  
ŝtelantaj malgrandajn pecojn de oro.

Tio estas la kruca sufero de farmisto,  
tio estas la vojo de farmisto al paradizo;  
tio estas la pordo de farmisto al feliĉo;  
tio estas la paso de farmisto al beno.

Kiam vi trovis akvon bolantan nevarman?  
Kiam vi trovis hakilon akran neakrigitan?  
Bonkvalita feliĉo ekaperos el suferado.  
Por manĝi kiel reĝo, laboru kiel sklavo!

Noemuti-Timoro, februare 2011  
Esperantigita el la poemo "Sutaise in fuan",  
verkis davanlingve kaj esperantigis Yohanes  
Manhitu

### Bela sono el la ĉielo



#### Al Wolfgang Amadeus Mozart

Jam multfoje via bela muziko  
akompanas min dum mia longa serĉo.  
Mia koro dronas en senfinaj melodioj  
ordonantaj paŝojn de tempo-vojaĝo.

Ĉiufoje kiam mi aŭskultas vian belan muzikon,  
mia koro fariĝas plena je paca fluo  
venanta el la vasta ĉielo,  
vere tio similas voĉon de anĝela grupo.

Kvazaŭ vi ĉiam invitus min por ekpasi  
atingi la centron de ĉi tiu bela sono,  
sin kaŝanta en malproksima loko gardata  
kaj via muziko fluas ĝis ĝia interno.

Via nomo, via voĉo transiras landlimojn  
kaj plenigas la korojn de ĉiu generacio  
samkiel gepraava historio konservata  
por la generacioj loĝantaj surtere.

Tiu ĉi bela sono venas el la Eternulo  
kaj fluas tra la beleco de via muziko.  
Mia koro fluas en la aŭskulta ĝojo  
kaj gloras la Reĝon en la ĉielo.

Jogjakarto, oktobre 2012  
Esperantigita el la poemo "Hanaf alumat nâko neno-  
tunan",  
verkis davanlingve kaj esperantigis Yohanes  
Manhitu



# Por infanoj

## La eta rano kaj la reĝidino

La eta rano decidis geedziĝi. Ĝi elektis belegan junulinon, la filinon de la reĝo. Ŝi estis tiom belega, ke tian oni ne vidis sur la tuta terĝlobo.

Ĝi ekiris por peti la maneton de la reĝidino.

Ĉe la pordego la gardisto haltigis ĝin.

-Kien vi iras eta rano? – demandis mire la gardisto.

-Mi decidis edzinigi la reĝidinon - venis tuj la respondo.

La gardisto lasis eniri ĝin en la fortikaĵon. Li pensis, la reĝo forpelos la edzokandidaton. Kaŝe li ridis, kiel la eta rano estos jetita el la fortikaĵo.



Ankaŭ la reĝo surpriziĝis ekaŭdante la deziron. Li tuj eksaltis kaj muĝis:

-Senkapigi tiun ĉi kuraĝulon! Kiel vi kuraĝas peti la manon de mia filino?

La eta rano restis trankvila kaj ĝi diris:

-Mia reĝa Moŝto, ne faru stultaĵon. Se vi senkapigus min, Vi ne scias, kio mi estas?

-Mi bone vidas, ke vi estas abomena besto. Fi! Mi ne volas vidi vin.

-Sciu, mi estas reĝido, sed kiam mi estis malgranda knabo, malbonintenca magiisto sorĉis min je eta rano. Se reĝidino kisos min, tiam mi denove fariĝos homo.

Tion la reĝo ne kredis. Li pensis, ke la besteto mensogas. Antaŭ ol ekzekuti la ranon li fermigis ĝin en karceron.

Li decidis ekzekuti la edzokandidaton alitage matene, kiam la unuaj sunradioj ĉirkaŭbrakumas la plej altan turon de la fortikaĵo.

En la karcero la eta rano sidiĝis sur la malmolan liton kaj ĝi komencis kanti. Ĝia kanto flugis al la ĉambro de la reĝidino. La fenestro estis malfermita kaj ŝi bone aŭdis ĉiun vorton de la kanto. Unue ŝi nur revante aŭskultis ĝin. La kanto estis tiom belega kaj agrabla, ke post iom da tempo la filino de la reĝo

ne povis toleri plu kaj ŝi kaŝe iris al la malgranda fenestro de la karcero.

-Kiu kantas ene tiom belege? – ŝi demandis timeme.

-Se vi kisos min, tiam vi ekscios – venis rapide la respondo.

-Kiel kisi vin? Vi estas ene en la karcero kaj mi estas ekstere.

-Metu vian buŝeton al la kaĝo de la fenestro kaj alia ne interesu vin!

La reĝidino obeis kaj ŝi metis ŝian buŝeton al la kaĝo. La eta rano eksaltis sur la fenestron kaj forte kisis la reĝidinon.

La kiso ĉarmis ilin ambaŭ. Kiam ŝi rekonsciigis post iom da paŭzo diris:

-Ja vi estas junulo pri kiu mi delonge revadas. Vi estas mia karulo.

-Bone diris mia unusola fianĉino – ĝojegis la reĝido, kiu ankoraŭ nelonge estis eta rano. – Matene mi petas vian manon de via reĝa patro kaj baldaŭe ni geedziĝos. Ni faros tiom grandan geedzan ceremonion, ke la tuta mondo estos invitita.

Tiam la reĝidino ekploris amare.

-Kial vi ploras kara mia? – demandis la reĝido.

-Kial mi ploras? Ĉu ankoraŭ vi demandas? Matene vin mia patro senkapigos.

-Pro tio ne ĉagrenu, kara reĝidino. Matene via patro estos la plej feliĉa, kiam ekvidos min. Nun reiru al via ĉambro kaj ne pensu pri malbono.

La reĝidino reiris al sia ĉambro, sed ŝi ne povis endormiĝi.

Apenaŭ mateniĝis, la reĝo kaj la ekzekutisto iris al la karcero kaj ili diris.

-Eta rano, alvenis la tempo, nun ni senkapigas vin. Adiaŭu de via vivo, ĉar plurfoje vi ne vidis la sunleviĝon.

Malfermante la pordon de la karcero ili tre, tre surpriziĝis. Anstataŭ eta rano staris antaŭ ili bela junulo. Li estis la sorĉita reĝido, kiel estis dirita hieraŭ.

-Dio mia! – ekkriis la reĝo. – Tiu eta rano parolis veron. Sed mi ne komprenas, kiel vi povis ŝanĝiĝi?

-Tio estu mia sekreto, mia reĝa Moŝto. Post la geedziĝo vi ekscios ankaŭ tion.

Vane estis la reĝo ege scivolema, la veron li eksciis nur post la geedziĝo, ke lia filino helpis al la reĝido kaj ŝi kisis la etan ranon.

Ili fariis tiom grandan geedzan ceremonion, ke la tuta mondo estis invitita, eĉ ankaŭ mi. De tie mi scias tiun ĉi fabelon.

Se vi ne kredas min, demandu la etan ranon kiun vi renkontos en la ĝardeno post pluvo.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

-Onklo Adalberto-





# Esperanto kongresoj



# Esperanto kongresoj

